# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Jaro 39-a BRAZI LO, JULI O-AŬGUSTO-SEPTEMBRO 2015 N-ro 159


"Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem."
JESUO (*Mt*, 22:37-40).

"Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro."
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo.* Ĉap. 19, §7.

"Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian."
ZAMENHOF. *La Espero*.



# ASOCIO LORENZ EN LA UNIVERSALA KONGRESO EN LILLO

Kun la ĉeesto de pli ol 100 geesperantistoj, venintaj el pluraj landoj, ASOCIO LORENZ realigis sian kunsidon kadre de la 100-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, en Lillo, Francio, la 28-an de Julio. Spiritismaj ideoj ne povus foresti en tia gravega interfrata aranĝo. Pro tio, oni pridiskutis fundamentajn spiritismajn temojn, laŭ la jena ordo:

D-ro João Silva Santos, homeopatia kuracisto, prezentis la konceptojn pri spirito kiel la centro de la homa konscio. Li trafe klarigis ankaŭ pri la fenomeno de "preskaŭ-morto" kaj prezentis gravajn verkojn, kies aŭtoroj funde okupiĝis pri tiu fenomeno.

D-ro Elmir Santos, infankuracisto, klare prezentis la kongruecon inter la spiritismaj instruoj kaj la scienco, tiel ke nenia kontraŭdiro ekzistas inter ili ambaŭ. Tiu kongrueco inaŭguris novan eraon en la koncepto pri religio en la mondo.


D-ro Paulo Sérgio Viana , ĝeneralklinika kuracisto, fine parolis pri la tri aspektoj de spiritismo: la filozofia, la scienca kaj la religia. Ĉi tiu triparteco faras spiritismon moderna koncepto, tute akceptebla de raciaj, nuntempaj homoj, surbaze de rezona fido.

Post la prelegoj, la publiko montris grandan intereson kaj faris diversajn demandojn. Fine, oni lotumis spiritismajn librojn, kiujn la publiko entuziasme akceptis. Dum la sama kunsido, okazis la lanĉo de la jam tradicia ALMANAKO LORENZ. Ankaŭ rimarkindas la partopreno de ASOCIO LORENZ en la MOVADA FOIRO, kongresa aranĝo en kiu ĉeestas pli ol 120 landoj. ★

Informas Paulo Sérgio Viana



# AMIKOJ DE LORENZ



**Plej frate kaj danke ASOCIO LORENZ brakumas ĉi-foje nian karan amikon DANILO CARVALHO VILLELA, emerita militisto, direktoro de "LAR FABIANO DE CRISTO", unu el la plej gravaj filantropiaj institucioj en Rio-de-Ĵanejro, kaj ankaŭ respondeculo kaj ĉefredaktoro pri la portugala kaj esperanta versioj de la bulteno SEI (SPIRITISMA ESPERANTO-INFORMILO, rete atingebla en: http://www.boletimsei.org.br). Danilo ankaŭ estas profesoro pri matematiko kaj, kun granda ĝojo, ano de nia Eldonejo. Dankon, kara Frato!**



**KUNLABORU!** – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

***COLABORE!*** *– Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!*

POEMOJ EL LA PLI GRANDA MONDO

## ANKAŬ MI VOLAS KUNLABORI

Dum longa tempo mense enmergite
en ondojn de memoro, tre diversajn,
je iu tago aŭdis mi subite
parolojn klarajn, kaj eĉ frazojn versajn
en lingvo, kiun ŝatis mi surtere:
En Esperanto, la ligil' benita
de la nacioj, kiujn fat' mistere
disigis per malam-ide' milita.
Ekĝojis mi, aŭdinte en ĉi sfero
paroli tiun lingvon de l' homaro,
ĉar renaskiĝis en mi la espero
post terurigaj pensoj de amaro.
Humile volas ankaŭ mi labori
por la proksima venko de la Bono;
ne estas tempo nun por plendi, plori,
sed por konstrui jam per ŝton' post ŝtono
pli altan homan civilizacion,
pli puran, kun amcel' , kulturon,
kunigi harmonie la racion
kaj koron, kaj kun l' arto la naturon.

30/12/1943

*Stanislav Schulhof* [Spirito]

SCHULHOF, Stanislav. Dentkuracisto, naskiĝis en Lipka en 1864 kaj mortis en Pardubice en 1919. Ĉeĥa verkisto kaj fervora esperantisto. Li lasis tri volumetojn de poezioj en Esperanto kaj komencis grandan epopeon, kiun la morto interrompis.

LORENZ, Francisco Valdomiro. "Voĉoj de poetoj el la spirita mondo". Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1987. 2. eldono. p. 71.

LORENZ

**"KOMUNIKOJ"**

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 39-a – n-ro 159 – Julio-Aŭgusto-Septembro 2015

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

**KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:**

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonoj: + **55-21-2452-9039** - + **55-21-2450-4768**
Skajpo: **Lorenz Editora** | Fejsbuko: **Editora Lorenz** | Retadreso: **editora_lorenz@uol.com.br**
Retpaĝo: **http://editoralorenz.blogspot.com.br**




Kompostita de Rogério Mota

# Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof

Al Majnov, 1889

Estimata sinjoro!

La "Neĝan Blovadon" mi hodiaŭ sendis al vi. Sinjoro de Wahl skribis al mi, ke danke vian penon ni havos cenzuriston por nia lingvo; mi tial sendas al vi mian plej koran dankon. Kiam vi havos la finan respondon de la cenzuristo, mi petas vin tuj skribi al mi.

Vi petas ke mi sendu al vi kelkan nombron da ekzempleroj de ĉiuj verkoj; pri tio sama petis min ankaŭ sinjoro de Wahl. Por ne sendi aparte al vi kaj aparte al sinjoro de Wahl, mi sendis hodiaŭ paketon da libroj al s-ro de Wahl, kaj el tiuj libroj vi povas ankaŭ preni kiam vi bezonas. Mi sendis nur al unu el vi, ĉar mi scias, ke vi apartenas al unu rondeto kaj vi vidas vin ofte kaj povas preni unu de la alia; sed se vi bezonas havi ankaŭ aparte kelkan nombron da libroj, skribu al mi, mi elsendos. La koston de la transsendo mi prenas sur min, kaj tiel vi povas vendadi la librojn laŭ la kosto nominala, aŭ se vi volas, vi povas ilin vendi eĉ kun kelka rabato.

IOM Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Tokio: Eldonejo Ludovikito, 1989.

## EL LA EVANGELIO – FELIĈO, KIUN LA PREĜO ALPORTAS

"Pro tio mi diras al vi: Kion ajn vi petos, preĝante, kredu, ke vi tion jam ricevis, kaj vi ĝin havos". Marko 11:24


Nekredemaj homoj! se vi scius, kiel la fido bonfaras al la koro kaj kondukas la animon al pento kaj al preĝo! la preĝo! ho! Kiel kortuŝaj estas la paroloj el la buŝo en momento de preĝado! La preĝo estas la dia roso, mildiganta la tro fortan varmon de la pasioj; unuenaskita filino de la fido, ĝi gvidas nin sur la vojeton, kiu kondukas al Dio. En via enpensiĝo kaj en soleco, vi estas kun Dio; Li jam ne estas mistero: Li senvualigas Sin al vi. Marŝu, marŝu sur la vojo de la preĝo, kaj vi aŭdos la voĉon de l' anĝeloj. Meze en kiaj ĉarmoj vi marŝos! Viaj lingvoj ne povos difini tiun feliĉon, ĉar ĝi eniras tra ĉiuj poroj, ĉar la fonto, el kiu oni trinkas dum preĝado, estas vivdona kaj refreŝiga! Vi ankaŭ preĝu, kiel preĝis la Kristo, portante sian krucon al Golgota aŭ Kalvario: portu vian krucon, kaj vi sentos la dolĉajn emociojn, kiuj trapasis lian animon, kvankam ŝarĝita per malhonoriga kruco; li iris al la morto, sed por vivi la ĉielan vivon en la hejmo de sia Patro. (Sankta Aŭgusteno. Parizo, 1861.)

KARDEC, Allan. "La Evangelio laŭ Spiritismo". Tradukis Ismael Gomes Braga. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2008. Ĉapitro 27, Petu, kaj vi ricevos. § 23.


**_Kuba Esperanto-Asocio invitas vin al Havano! Partoprenu!_**




# LORENZ 40-JARA













En Decembro 2015 oni festos la 40-jaran datrevenon de SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ. Dum la lastaj kvar jardekoj publikiĝis pluraj verkoj helpe de la apogo kaj sindonemo de multaj amikaj samideanoj, kiuj subtenis la laboron de la ASOCIO kaj strebis al ties daŭrigado. Ĝia precipa celo, laŭ propra statuto, estas la disvastigo de Spiritismo al la esperantistoj, pere de Esperanto, kaj de Esperanto al la spiritistoj.

La elekton de la publikigotaj libroj faras la Eldona Konsilio, laŭ la doktrina kaj evangelia pureco. Skipo de volontuloj sindediĉas al la traduko kaj revizio de la verkoj. Gravegaj spiritismaj verkoj jam estis publikigitaj kaj disdonitaj en la kvar anguloj de la mondo per ASOCIO LORENZ.

Krom tiu eldona laboro, la ASOCIO ankaŭ disvastigas sian idealon per la publikigo de du periodaĵoj: la trimonata bulteno KOMUNIKOJ kaj la ĉiujara ALMANAKO LORENZ. La katalogon de la akireblaj verkoj kaj ankaŭ la disponeblajn eldonojn de KOMUNIKOJ kaj ALMANAKO LORENZ oni konsultu en la paĝo: http://editoralorenz.blogspot.com.br/

Mendu kaj disvastigu la librojn de ASOCIO LORENZ, kaj tiel helpu la daŭrigadon de tiu laŭdinda laboro. Ankaŭ vi povas rekte partopreni, se vi fariĝas membro de la ASOCIO. Ke Dio benu tiun laboron, kaj ke en la tuta mondo oni povu facile kontaktiĝi kun la spiritismaj libroj, kiuj kunportas konsolon, instruon kaj lumon al la homaro!

## LA PROMESITA LANDO – KONSILOJ DE GAMALIEL AL PAŬLO, EL LA LIBRO "PAŬLO KAJ STEFANO"

– Koncerne la malfacilaĵojn, pri kiuj vi diras, ke vi ilin travivis, post la okazaĵoj en Damasko, en miaj okuloj spertaj en la problemoj de la mondo tio ja estas justa kaj natura. Niaj praulоj, antaŭ ol ricevi la manaon de la ĉielo, trapasis nigrajn tempojn de mizero, sklaveco kaj sufero. Sen la afliktoj en la dezerto Moseo neniel trovus en la senviva roko la fonton de viva akvo. Kaj vi mem, vi eble ne pli profunde iam meditis pri la revelacioj rilataj al la Promesita Lando. Kia regiono tiu estis, se, en pli vasta senco komprenante Dion, ni trovas en ĉiuj lokoj de la mondo fontojn de Lia protekto? En miaj solulaj meditadoj mi venis al la konkludo, ke la Promesita Lando de la diaj revelacioj estas la Evangelio de la Kristo Jesuo. Alkonformiĝi al la Evangelio estas eltrovi alian landon, kies amplekso perdiĝas en la senfineco de la animo. Apud ni staradas homoj, kiuj faras ĉion eblan, por debati nin de la konkerita entrepreno. Sed, pensante pri tiu miregiga sereneco, kun kiu Stefano elspiris sian animon, mi vidis en li la modelon de la brava kaj digna kunbatalanto, kiu revenis de la instruoj de la "Vojo", por diri al ni, ke en la Lando de la Evangelio ekzistas fontoj de la lakto de saĝo kaj de la mielo de la dia amo. Estas do necese iradi sen ripozo kaj ne atentante la barojn sur la vojo. Ni iru al la senlima domo, kiu altiras al si nian koron.

XAVIER, Francisco Cândido. "Paŭlo kaj Stefano". Historia romano diktita de la Spirito Emmanuel. El la portugala lingvo tradukis L. C. Porto Carreiro Neto. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1966. Parto 2-a, ĉapitro 2-a – La teksisto.

# Esperantistaj Poetoj



## Patrino Kun Infano

*Marie Hankel*

Tra landoj mi migris, tre multon mi vidis,
Tre strangajn kutimojn kaj morojn aliajn.
Mi miris, kompatis, aprobis aŭ ridis,
Sed ĉiam respektis kutimojn la piajn.

Diversaj la bildoj de l' Dioj ja estis,
Teruraj kaj mildaj, majestaj kaj belaj.
Kaj ĉie piuloj preĝadis kaj festis,
Kun koroj sindonaj, al kredo fidelaj.

La homoj al bildoj prezentis adoron,
Serĉante konsolon, petante la sanon.
Plej multe al mi dolĉimpresis la koron
La bild' de patrino, sur brako l' infanon!

El la verko "Esperanta Antologio: Poemoj – 1887-1981", redaktita de William Aŭld kaj eldonita de Universala Esperanto-Asocio en 1984.

HANKEL, Marie (1844-1929). Germanino. Lernis E-on en 1903. Ano de la Lingva Komitato. Ŝi estis la plej konata poetino de la unua periodo de Esperanta literaturo. Per sia poemo "La simbolo de l' amo" ŝi gajnis la unuan premion en Internaciaj Floraj Ludoj dum la 5-a UK en Barcelono (1909), fariĝinte tiel "la reĝino de la Internaciaj Floraj Ludoj".

(Resumo el informoj trovitaj en "Ordeno de Verda Plumo: leksikono pri esperantlingvaj verkistoj", verkita de Josip Pleadin k eldonita de GRAFOKOM en 2006.)

# ESPERANTO EN LA BRAZILA SPIRITISMA MOVADO

La iniciaton veki la intereson de la spiritistoj pri Esperanto ni ŝuldas al la senkompara figuro de LEOPOLDO CIRNE, kiam li, kiel prezidanto de la BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO (BSF), publikigis gravan deklaron de francaj spiritistoj pri la lingvo, pere de teksto presita en la oficiala organo de BSF, la revuo "REFORMADOR", en la 15-a de Februaro 1909. La originala franca-lingva artikolo estis unue aperinta en Decembro 1907, en la "Revue Scientifique et Morale du Spiritisme", eldonita de Gabriel Delanne. Jen kelkaj tekstopecoj de la artikolo "Spiritisme et langue internationale", de J. CAMILLE CHAIGNEAU:

"Esperanto estas lingvo kreita de D-ro Zamenhof, kiu havas adeptojn en la tuta mondo (pli ol 80.000) kaj evidentigas sian kreskantan vivipovecon, siajn grandegajn progresojn en notindaj kongresoj, dank' al sia facileco kaj internaj kvalitoj. Favoras al ĝi argumento findecida: ĝi estas parolata.

"Pro la kvanto da faktoj, kiujn al ni, spiritistoj, ne eblas koni manke de traduko, kaj pro la malfruo kaŭzata de traduko mem al nia dokumentado, ŝajnas, ke Spiritismo devas havi plenan intereson fondi centran revuon, kie kolektiĝus la plej gravaj faktoj dank' al lingvo komuna al ĉiuj landoj. Necesas do, ke Spiritismo profitu tiujn avantaĝojn. La nura fakto utiligi Esperanton starigas fratan ligilon inter ĉiuj esperantistoj kaj faciligas la skriban aŭ parolan interkomunikiĝon de ĉiuj doktrinoj. Ĝi estas do absolute utila al ĉiu sincera ideo.

"Se ni volus malkovri la genezon de tiu lingvo, ni ja konstatus, ke ĝi montriĝas kiel instrumento de kunlaboro kun la Nevidebla Mondo. Tiu senpersoneco konsistigas ĝian superecon; tiu kunhelpo estigas ĝian altirforton. Ĉiuj, kiuj laboras sur la kampo de la progreso, kunagos favore al tiu verko tiel bela kaj tiel fekunde efika por la homa interproksimiĝo. Esperanto entenas la flamon de la frateco; ĝi nepre vivos. Koncernas la spiritistojn profiti el ĝiaj vivodonaj aspiroj kaj al ili vigligi la vivipovecon."

Artikolo originale publikigita en la retpaĝo de BSF:
http://www.febnet.org.br/blog/geral/estudos/esperanto-en-la-brazila-spiritisma-movado/

Vidu la francan-lingvan artikolon de J. Camille Chaigneau en:
http://encyclopedie.spirite.org/docs/RSMS/RSMS1907_1908.pdf

# ESPERANTO EN GRAVA INTERNACIA LIBROFOIRO




ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO-DE-ĴANEJRO (AERĴ) partoprenis en la ĵus okazinta INTERNACIA LIBROFOIRO DE RIO-DE-ĴANEJRO. Ĝi temas pri kelktaga ekspozicio kaj vendejo, kie centoj da organizoj proponas siajn varojn. Oni prezentas ankaŭ krome kunsidojn kun aŭtoroj, prelegojn, diskutojn, lanĉojn de verkoj, ludojn. La publiko, kompreneble, interesiĝas pri literaturo, kulturo, edukado – do perfekte taŭga publiko por informado pri Esperanto.

AERĴ organizis kampanjon por monkontribuoj, serĉis sponsorojn, kunigis volontulojn kaj kunmetis trejnadon por profesinivela prezento de Esperanto al la publiko. Vere ampleksa laboro, kiu postulis zorgan plenumadon, paŝo post paŝo. Fine, je la 3-a de Septembro 2015, malfermiĝis la granda foiro kaj Esperantobudo digne montriĝis en la verda pavilono, plentempe.

Oni povas diri, ke tiu iniciato de AERĴ estis plene sukcesa. Oni disdonis 8000 flugfoliojn pri Esperanto dum la dek tagoj de la evento. Kolektiĝis 700 retadresoj kaj telefonnumeroj de vizitintoj, kiuj interesiĝis ricevi informojn pri Esperanto. Oni okazigis en Rio rapidajn kursojn dufoje ĉiutage, pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kaj por lingvoenkonduko por junuloj. Ankaŭ en la proksima urbo Niterói okazis rapidkursoj. Centoj da homoj entute enskribiĝis en la diversaj kursoj; multaj homoj montriĝis interesitaj lerni la lingvon per interretaj kursoj.

La interesita publiko konsistis precipe el junuloj – bona afero! Eble tio estas imitinda agado, en aliaj landoj. Pri unu punkto ne restas dubo: se oni havas limigitajn monrimedojn kaj homfortojn, tiam oni saĝe elektu la publikon por informado. Kaj publiko, kiu serĉas librojn certe estas tute taŭga.

Informas: Paŭlo Sergio Viana, en la retpaĝo:
http://esperantaretradio.blogspot.com.br/2015/09/esperanto-en-grava-internacia-librofoiro.html

Aliajn informojn kaj fotojn vidu en:
http://esperantoilustrado.blogspot.com.br/2015/09/filmraporto-pri-la-17-internacia-libro.html

http://aerj.org.br/bienal-do-livro



# MORALA PERFEKTECO, EL "LA LIBRO DE LA SPIRITOJ"

**895. Krom la malbonaj flankoj kaj malvirtoj, pri kiuj neniu povus erari, kiu estas la plej karakteriza signo de neperfekteco?**

"Ĝi estas la persona intereso. La moralaj kvalitoj estas ofte kiel orumaĵo sur kupra objekto: ĝi ne rezistas al provilo. Iu homo povas posedi realajn kvalitojn, pro kiuj la mondo lin kredus virtulo; sed tiuj kvalitoj, kvankam ili estas progreso, ne ĉiam eltenas iajn provojn, kaj sufiĉas iafoje tuŝi lian personan intereson, por ke ties fundo estu malkaŝita. Vera sinforgesemo estas tiel malofta sur la Tero, ke, kiam ĝi aperas, ĝi estas rigardata kiel stranga fenomeno".

**912. Kiu estas la plej efika rimedo por kontraŭbatali la superregadon de la korpa naturo?**

"Abnegacii sin mem".

KARDEC, Allan. "La libro de la Spiritoj". El la franca lingvo tradukis L. C. Porto Carreiro Neto. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2007.